GISTO,majo,2009.
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
95760-000 Kaiurbo-RS – Strato Esperanto,880
Senpage disdonata dum la Verda Kafo
Krom fore loĝantaj rondanoj ŝuldas R$1,00

.....

VIZITANTO

Admirindas la fila sindedicĉo de homo kiu ĉiujare flugas ĉirkaŭ 80 mil km, por revidi siajn panjon, parencojn kaj geamikojn.Tion plenumas nia gaŭcha londonano Lenio Marobin. Krom la veturelspezo nia bona samideano kaj samhobiano kunportas revuojn kaj donacojn por ĉiuj. Ĉi oldulo ricevis belan T-chemizon kun Esperanto sur la brusto. Domaĝo. Mi retribuis per nura Danko kaj bufeda tagmanĝo akompane de du radio-hobiistoj, Laŭro kaj Leo.Ĉi tiu pagis...!

ĈRI

Rilate propagadon mi raportas pri la signalo kiu atingas Sudamerikon laŭ 9860 kaj 7332 Khc: la forteco alternas inter unu kaj alia frekvenco, kaj tagoj. Malofte ĝi atingas S-9 kaj plus,.en la nuna sezono.Hodiaŭ 22/05, ambaŭ kun signalo nur S-3 !!

Peto.

Al niaj karaj ĈRI-anoj mi riskas peti favoron: la plusendon de jena plendo, al adekvata ekologia instanco de Ĉinio:

En *Internet* cirkulas informo, ke la ĉinoj uzas kaj eksportas ŝlosilingojn kun eta viva fiŝeto, ene de eta akvuojo dum la senkulpa fiŝo vivas. Post kelkaj tagoj ĝi mortas manke de oksigeno kaj manke de nutraĵo. Ekologiaj organizaĵoj protestas, inklusive mi, pro la kondamno al morto, post longa suferado. Ĉu vere ĉiu ĉino estas homo senkompata? Almenaŭ bonkoraj homoj tion pensos. Tio okazas en via lando. Memoru ke la ekologia movado ekzistas en la tuta mondo kaj vekos malamon akontraŭ ĉinoj. Ĵus okazis en Porto Alegre konferenco dutaga:BIOÉTICA", ĉiutage kun salono plenplena de tre intersataj homoj. Tie oni identigas organizaĵojn kiuj ignoras animalajn suferojn kaŭzatajn de homoj.

SKAJPO

Ĝojigaj QSO* okazas inter Kaiurbo kaj Arojo do Mejo. Nia diligenta rondano Arno preskaŭ ĉiutage atendas min je la 19,30h sur nia renkontejo Ni ambaŭ ankoraŭ ne lerte scias piloti la "maŝinon"...hi...hi...hi, sed jam okazas amuza babilado. Ni esperas ke skajpanoj vizitu nian renkontejon kaj ke la babiladoj enradikiĝo por ke ĉiutage okazu E-rondo pri kurantaj aferoj, laŭ tempo disponebla. Mi mem tie restas nur duonhoro, inter vespermanĝo kaj ĈRI-aŭskultado. La ĉinoj ĉitage atingas Sudamerikon per signalo S9, pere de mia radioamatora aparato. – Mi tristas ĉar eĉ ne post kiam mi ripetis mian peton al Gisto-legantoj, ke ili helpu subteni la ĈRI-skipojn antaŭ la ĉina registaro. Tie ne envenis leteroj far brazilaj aŭskultantoj. Oni memoru ke, manke de alsenditaj leteroj lastatempe fermiĝis la E-elsendoj de Svisio kaj tiu de Pollando. Ĉu la gaŭĉaro celas fini la E-movadon?! Pigruloj, aktiviĝu – *telekomunikado inter du aŭ pluraj stacioj.

SEKSPERFORTO

Jen temo kiu pensigas seriozajn homojn. Oni ja scias ke tia peforto envolvas plurajn facetojn. Viro delonge karenca, kiel prizonuloj, kapablas disrompi

muron, por atingi sian celon, kaj certe eluzos la unuan ŝancon kiu al li prezentiĝas. Kvankam nenormala ago, ĝi etgrade praviĝas tamen, post amorado, ĉe kvazaŭ paradiza plezuro, fini la fifaron per mortigo, tio por mia kompreno estas tute nekomprenebla. Memorigo al vi la kovardan agon de la ŝarĝaŭta veturigisto kiu mortigis la dentkuracistinon ĉe la ŝoseo inter la marbordo kaj la urbo Kaŝias-RS. Oni ja scias nur supraĵe pri la okazintaĵo. Laŭ la preso.kaj onidiroj.la kamionisto ie faris fuŝan manovron, preskaŭ damaĝis ŝian aŭton. La ino devis rapidege fari memdefendan manovron. Tuj poste ŝi agresis lin per aĉaj riproĉoj. Ambaŭ veturis samcele, prue al Kaŝias. Dumvoje ŝi haltis ie. Baldaŭ li . devancis ŝin. Je preterpaso unu rikanis la alian. Pro iu motivo, ankoraŭ ne klarigita, ŝi devis haltigi sian aŭton ĉe la ŝoseo, for de iu ajn konstruaĵo. La polico rompas sian kapon, por eltrovi la motivon kial ŝi devis(?) haltigi la aŭton, se ĝi estis tute nova modelo, supozeble preskaŭ sen ebleco suferi paneon. De ĉimomento ĝis la eksperforto la konjektoj ŝvebas vake, ĝis la aŭtoritatuloj espereble sukcesos klarigi la detalojn. La dentistino, laŭ fotoj, estis tre bela kaj juna persono. Al mi restas pensi, ke la motivo por mortigi estas la timo ke ŝi postlasis signojn, laŭ kio li estos konsiderata la sola kulpulo. Aŭ, ĉu tuj post lia fiago ŝi, kolerega kaj Senpripense, diris al li gravajn ofendojn aŭ ĉu ŝi faris la eraron diri al li, ke ŝi al preterpasanta veturigisto irigis altvaloran informon (?), ekz. SOS, laŭ kiu li kolerigite perdis la rezonkapablon por regi sin kaj, soifa je sango, mortigis ŝin. Kristane li certe ne kondutis.

JES JA!

Belajn novaĵojn pri ekologio rikoltis nia diligenta Cezar en sia legin(en)da bulteno Jes Ja! Unu el ili, tre plaĉas al mi: la planko de dancejo en Roterdamo, farita el LEDs eluzas la dancmovojn por transformi ilin en energion kaj per ĝi nutri la etajn lampetojn, enkrustitajn en la planko, kaj tiel lumigi la tutan dancosalonon de malsupre kaj ŝpari elektron el la respektiva reto. – Alian edifan fakton ĝi sciigas: La hispana lingvo, la dua plej parolata lingvo en la mondo...11 milionoj lernas ĝin ke en Brazilo kreskas la multobligo de homoj kiuj lernas la lingvon de niaj najbaraj landoj. Utilega kiam oni spektas filmon aŭ artan prezentadon en tiu lingvo, por ĝisfunde ĝui la spektaklon, komprenante gestojn, popolajn dirmanierojn kaj *chistes*. Des pli bone se oni povas restadi longe inter niaj *hermanoj,* en ĉiutagaj rilatoj dum kelkaj monatoj. Ĵus mi spektis la “fabrikon” de Tangoj, en “Cine Bancários”, prezentanta “Kafé de los Maestros” kaj .aliajn.saŭdadomortigajn muzikeroj, kun ĉ.30 famaj tangaj moŝtoj. Kiu el vi ne eluzis la ŝancon, tiu perdis multan plezuregon. La prezentado finas majofine.

Bonhumoro.

MUTIĜO (el DG)

Geedza paro kverelis hejme kaj ambaŭ decidis ĉifoje ne per seksa striko sed jes per mutiĝo inter ili.. Tamen venis vespero kiam li devis sekvan tagon frue ellitiĝi por atini la flughavenon sed ne plenfidis ĉu li aŭdus la vekhorloĝan skandalon Li tamen ne volis esti la unua rompi la mutadon. Sur paperfolio li skribis, bonvolu veki min je la kvina matene kaj metis ĝin sur lokon kie ŝi nepre ekvidos la skribaĵon - Sekvan tagon li vekiĝis je la naŭa kaj memkompreneble perdis sian flugon. Tio estis, pensis li, motivo por per tondra riproĉo rompi la mutecon sed, antaŭ ol ekparoli, li trovis je sia flanko skribaĵon: Estas la kvina, stariĝu!